

**ROK XXV.
LIPIEC
N-r 7.**



**JARO XXV.
JULIO
N-o 7.**

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Komerca Akademio, en kiu estos la Kongresejo.

**ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO**

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ:

SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
TADEUSZ HODAKOWSKI

REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

1 strona	Zł. 60.—
1/2 strony	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—

ANONCOJ:

1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 paĝo	„ 32.—
1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 paĝo	„ 10.—

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

KORESPONDADO.

Sendu 8 resp. kup. kaj vi ricevos tuj afrankite JAVAN PAKETON enhavantan 1 ekz. Javaj Legendoj, 1 ekz. Multatuli: Historio de Saidjah, 1 ekz. Malaja Esp. Ŝlosilo, 1 n-ron de „Hinda Esperantisto“. Skribu al S-ro LIEM TJONG HIE, SEMARANG, Java.

Senlaboranto serĉas kielajn laboron en Kraków aŭ Katowice. Anoncojn al Adm. de „Pola Esper.“ por „Senlaboranto“.

Atentu!

Atentu!

Por fine detruji la muron de indiferenteco kontraŭ Esperanto, Laborista sekcio de beograda „Esperanto-Societo“ aranĝas aŭtune (15-an de oktobro 1931) grandstilan ekspozicion de ĉiuspecaj esperantajoj. Speciale ni petas diversnaciajn esperantajn lernolibrojn.

Esperantistoj, pruvu ke Esperanto vivas, utilas kaj progresas.

Sendu ĉion al:

ESPERANTO EKSPozICIO, BEOGRAD. Hotel „London“. JUGOSLAVIO.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXV JARO

KRAKÓW

Nr 7 N-o

LIPIEC 1931 JULIO

BONVENON AL VENONTOJ KRAKOVON!

Jam post kelkaj tagoj nia urbo Kraków gastigos la unuajn Esperanto — profetojn kun fervora genia instruisto, Sinjoro Pastro Cseh, kiu pere de sia famekonata metodo tiel efike influis por la disvastigado de la lingvo. Nia malnova kultura centro prepariĝas por la inda akcepto.

Se ĝis nun iu ajn dubis pri la konstante alproksimiĝanta venko de la Zamenhofa eltrovo, li je siaj propraj okuloj povas konstati profundan ŝanĝon de la opinio dum la lastaj jaroj.

Dum la oka Kongreso en Kraków mi ankoraŭ ofte vidis iom indulgeman sintenadon de multaj serioze pensantaj homoj, kiuj ŝajne opiniis ne tre firme pri la esperanta afero.

Nun vere estas esceptoj, kiuj ne volas konstati, ke lingvo helpa estas nepre bezono por ĉiuj kulturaj nacioj kaj ne rimarkis sur la horizonto iun ajn alian solvon krom la Zamenhofa eltrovo.

Do fine la profeto estas jam rekonita en sia propra lando.

Karaj samideanoj, bonvolu konatiĝi kun tiu lando de multaj suferoj, kiu nun restariĝis por la nova kunlaborado inter ĉiuj popoloj de la terglobo. Eĉ malliberiĝo ne povis neniigi la kulturan vivon kaj agadon. Des pli facile estos kunlaboradi de nun, kiam la nacio havas propran vivrajton.

Kulturu ni ĉiuj la komunan nian proprajon ĝis la fina venko!

Intertempe vi pasigos kelkajn tagojn en niaj rondoj, vizitante la postrestaĵojn de malnova preskaŭ miljara kulturo kaj arto.

Vi vidos nian internan vivon nuntempe ne tre gajan, ĉar la gajeco forlasis la mondon, pli aŭ malpli ĉie sammaniere. Ni, esperantistoj, esperu kaj subtenu ĉiam gajan optimismon kaj konkordan kunlaboradon por pli altaj celoj ol nia potaga griza vivo. En la laboro ni trovos veran ĝojan kontenton.

Ni preparis ĉion por kontentigi niajn karajn gastojn. Eble ni ne povos kontentigi ĉiujn. Antaŭ ĉio ni bedaŭras, ke la kotizo kongresa ne por ĉiuj estas ebla. Tro multaj fervoraj samideanoj devis rezigni pro la kostoj, kvankam ni penadis fari ĉion eblan por plifaciligado. Sed ĉiuj preparoj kostas multe da mono, kvankam en niaj vicoj oni laboras plej ofte senpage.

Do, Karaj Gesamideanoj el la tuta mondo, venu Krakovon grandare. Partoprenu la solenan feston de l' Esperantistaro. Ekkonu nian patrujon kaj tiun de la Majstro. Vi estos bonvenataj kaj kore akceptataj. Ni atendas vin!

O. Bujwid.

BOATA EKSKURSO TRA PIENINY.

KAZIMIERZ SOSNOWSKI.

Dum la Kongreso kaj post ĝi okazos kelkaj ekskursoj. La sekvantaj tri artikoloj entenas priskribon de la vizitindaj lokoj. Speciale atentinda estas la ekskurso al Pieniny kaj tiu al Morskie Oko.

Rava veturo boata tra la montaro Pieniny akiris jam vastan ĉarmon ne nur en Polujo, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj. Kaj nenio en tio ĉi estas miriga, ĉar dum la perboata traveturo vidataj Pieniny ankoraŭ pli grandan kaj potencon disradias ĉarmon, ol dum ili estas perpiede pasataj. La beleca sekreto de Pieniny'a intermontaĵo troviĝas en furoziaj kurbiĝoj de Dunajec, kiujn tiu ĉi rivero faras, trafluante tiun ne grandan envere, sed nekredeble fantazian, plenan de romantika ĉarmo neston de kalkaj ĉirkaŭaĵoj.

Kun efektive reĝa malavareco surŝutis ĉi tien la naturo la esencon mem de la belo kaj kreis nun la verkon, kiu en la animo je la belo impresebla kaj sentema vekas admiron kaj ravon, donas momentojn de sublimaj travivaĵoj kaj neniam forgesiblaj impresoj.

Rapidkura fluo de Dunajec, precipe dum la pli alta stato de l' akvo kaptegas kaj portas la boatojn rapideme kaj la vidaĵoj ŝanĝiĝas kelkfoje tiel rapide, ke malfacile oni povas al si tion konsciiĝi, kio antaŭ niaj okuloj preterglitiĝas. Fantaziaj formoj de l' apudajo, neesperitaj turniĝoj, muĝo kaj rapida kurego de la rivero subite malklarigas en la vojaĝanto senton de l' realeco kaj transportas lin en landon de revoj kaj iluzio. Komencas al li ŝajni, ke tio, kion li vidas, ne estas realaĵo, sed iu dormo narkota, iu sorĉista domo, mirŝanĝita kastelego kaj belega ĝardeno, kiun li vidis iam en infana fantazio, kiam li aŭskultis rakontojn pri feoj kaj neteraj fortoj.

La perboatan veturon komencas turistoj de Ruĝa Monaĥejo (Czerwony Klasztor), kie en ombro de maljuna arbaret' atendas montanoj la gastojn kaj farinte kontrakton surakvigas mallarĝetajn boatojn, kunligas ilin per ŝnuro kaj paniklo po du, tri aŭ eĉ kvar metas kruciĝe du tabulojn por sidi, prenas per manoj du stangojn kaj invitas okupi la lokojn. Apenaŭ ni debordiĝis, kaptis nin tuj rapida fluo de l' rivero kaj portas nin rekte sub abisman muron de „Tri Kronoj“. Ĉi tie la veturigistoj komencas labori. Kun kata lerteco ili depuŝas la boatojn de l' apudbordaj aŭ troviĝantaj en la fluejo rokoj, kiuj minacas al la boatoj per frakaso, direktas ilin sur plenan akvon kaj kaŭzas ilian tro rapidon kuron. Apud la „Rabista salto“ la akvo ŝaŭmiĝas, ondegigigas, leviĝas arke en tro mallarĝan fluejon, saltas per ondo supren. Laŭ ĝia moviĝo komencas ankaŭ ondadi la boato, ariĝas mezen la vojaĝantoj, la akvo ŝprucas sur ilian vestaron, eniĝas en la boaton. Tamen post momento trankviliĝas la rivero kaj ni fluas malrapide, kvazaŭ sur silenta plato de lago. La veturigantoj demetas la stangojn, elverŝas la akvon el la boatoj, la vojaĝantojn forlasas la streĉeco de nervoj kaj kviete ili aŭskultas klarigojn de la montanoj pri l' apudbordaj vidaĵoj, pri la monaĥoj, monaĥino kaj la rabista salto.

Sed baldaŭ ripetiĝas la samo, kion antaŭ nelonge ni preternaciĝis. Ree la turniĝo, ree la vortikoj kaj rokoj en la fluejo, ree la akvo

ĵetiĝas per sovaĝa kurego en mallarĝan intermontaĵon kiel la malbri-dita ĉevalo stepa kaj portegas nin sur sia dorso.

Ludo je danĝero varmigas la sangon, ekbruligas la fajron en vejnoj, instigas la laboron de menso kaj nervoj. Ĉiu turniĝo incitas la sciemon kio estos plue, kion faros kun ni tiu ĉi furioza rivero, sub kies potencon ni submetis nin. Kaj ĉiam pli novaj vidaĵoj preterpasas antaŭ niaj okuloj kaj ciam pli belaj, kvankam estas malfacile kredi, ĉu povas esti io pli bela ol tio, kion ni vidis aŭ ĉimomente vidas.

Do plej vigle laboras la imago, kiam post la „Malfermita Fandejo“ ni enveturis en mallarĝan intermontaĵon, fermitan per altstara rokego. La rokoj kunestas tiel proksime, la intermontaĵo estas tiel fermita de ĉiuj flankoj, ke ŝajnas, ke la rivero nepre malaperos en iu subtera tunelo. Kio fariĝos? Vi demandas vin mem pri tio, kuregante ĉiam pli rapide kontraŭ la kruta rokego. La veturigisto ĉefanta tenas la stangon celatan antaŭ sin, li puŝis forte je l' subakva rifo, la stango krevis. Per linka salto li kaptis la alian el fundo de l' boato, li puŝis kontraŭ la roko unufoje kaj duafoje, la boato turniĝis forte kaj ni enveturas sur ĉarman kampeton rondfermitan per rokoj. La rivero disfluas ĉi tie pli larĝen, ĝi fluas malrapide kaj en siaj diafanaj ondoj respegulas la sovaĝan ĉirkaŭaĵon.

Ni travivas ankoraŭ kelkajn emociojn, por post mallonga jam veturo fini la fantazian navigadon ĉe la limoj de la vilaĝo Szczawnica.

Antaŭe riĉaj somerumantoj aranĝadis paradon kaj pompan veturon tra Pieniny kelkdekope. Ne mankis tiam montana aŭ cigana muziko, vivu-pafoj, vigla gajeco, brilo de torĉoj, kiam oni elektis noktan tempon. Ankoraŭ vivas la tradicio de tiuj grandiozaj ekskursoj eĉ nun, kaj kiu volas esti sub sorĉo de tiu romantika veturo, elektas noktan tempon ĉe lunpleno.

Tradukis T. Hodakowski.

KRYNICA, PERLO DE KURACLOKOJ EN POLUJO.

En valo de rivero Kryniczanka, ĉe la piedoj de ĉarmaj Karpatoj, en baseno ŝirmita norde per montoj, kun deklivo malfermita al sudo situas loĝloko, kiu propradiĝe estas nek vilaĝo, nek urbo — sed estas simple Krynica. Tiu ĉi „magia“ vorto jam depost jaroj efikas kiel magneto, allogante de longtempo grandajn arojn da kuraciĝantoj, kiuj serĉante helpon en diversaj doloroj, trovas en tiu apudkarpata loko, dank' al la multaj fontoj tie ekzistantaj, helpon kaj savon.

Kiam ni mencios mildan klimaton, kvazaŭ apud-Alpan, ĉirkaŭaĵon montoriĉan, arbarumitan, puran aeron, plenan de ozono, tiam ni facile ekkomprenos kial Krynica estas unu el plej valoraj perloj de niaj polaj kuraclokoj.

Krynica posedas 10 fontojn kuracajn, el tiuj Zuber estas la plej

forta alkalia mineralakvo, ne malpli valora ol tiu el Karolove Vary, Ems, Vichy aŭ Billin; la aliaj fontoj (ferhavaj) posedas ankaŭ altan kuracan valoron.

Bonegaj efikoj de Krynica-akvoj en multaj malsanoj, nome tiuj de spirvojoj, kronikaj stomakaj malsaniĝoj, intestoj, hepato kaj galo-vojoj, renoj kaj urinvojoj kaj ŝtofŝanĝaj malsanoj (podagro, diabeto, dikkorpeco), de endokrinaj glandoj, de koro kaj sango, virinaj malsanoj kaj nerva elĉerpiĝo, pruvitaj per multejara praktikado kaj sciencaj esploroj de plej grandaj eminentuloj kuracistaj, donas ĝuste tiujn ĉi netakseblajn valorojn al la Krynica'a kuracloko.

Krynica dum lastaj kelkaj jaroj efektive grave disvolviĝas. Pri tio atestas ĉiam pli grandiĝanta frekventeco al tiu kuracloko, kiu montras efektive imponan por niaj cirkonstancoj nombron de 40.000 personoj venintaj tien lastjare, kompare kun 6.000 en la j. 1918.

Kompreneble tion iom kontribuis la ŝanĝitaj politik-ekonomiaj kondiĉoj, malfaciligante nun kelkgrade forveturojn eksterlanden, sed precipe tio ĉi estas la merito de nuna estraro de la kuracloko, kies racia kaj intensiva mastrumado kreis el Krynica efektive eŭropan kuraclokon.

Antaŭ ĉio, celante pligrandigi la frekventecon, oni devis konstrui sufiĉan nombron da loĝejoj, povantaj kontentigi ĉiam grandiĝantan nombron de alvenantaj kuracatoj kaj gastoj. Tiucele de post la reakiro de la sendependeco oni konstruis tie 4000 ĉambrojn, oni starigis laŭ okcidenteŭropaj modeloj belegan kuracdomon, la alia estas nun konstruata, krom tio oni faris multajn gravajn plibonigojn, sen kiuj ne povas esti racie gvidata font-kuracloko, do oni elkonstruis novan elektrofarejon, buĉejon, oni aranĝis kanalizon kun deviga kontaktigo al ĝi de ĉiuj domoj kaj vilaoj, fine oni elkonstruis novajn banejojn vintrajn kaj multajn kuracajn uzinojn.

Sed la plej ĝojiga en tiu senĉesa disvolviĝado de Krynica estas la fakto, ke kvankam malrapide, tamen konstante ĝi fariĝas eŭropa fontkuracloko ne nur dank' al instalaĵoj, oportunaĵoj kaj eĉ al kelka racia komforto, sed ankaŭ pro tio, ke ĉiam pli ofte vizitas ĝin fremduloj, kiuj ne sen ioma miro konfirmas, ke Krynica neniom aŭ preskaŭ neniom malpli valoras ol la famigitaj kuraclokoj okcidenteŭropaj, kaj rilate la kuracvalorojn ofte ilin superas.

Sendube, al tiel feliĉe komenciĝinta propaĝando de Krynica eksterlande, helpis grandmezure la fakto, ke Krynica dum lastaj jaroj, profitante nekutime favorajn cirkonstancojn terenajn kaj klimatajn, fariĝis unu el pli gravaj centroj de vintraj sportoj. Por atingi tiun celon oni elkonstruis tie modernan skisaltejon, hokejajn, glitveturilajn, kaj glitilajn placojn. Oni estas komencinta aranĝadi ĉiujarajn internaciajn sportkonkurojn, pro kiuj kunveturas miloj da sportuloj ne nur polaj, sed ankaŭ eksterlandaj kaj tio donis al la estraro instigon enkonduki vintrajn sezonojn, kiuj trovas favoran rekonon de multaj kuracatoj, pasigantaj tie en bonegaj klimataj cirkonstancoj la vintrajn monatojn.

MORSKIE OKO.

Popollegendo el la pola Tatra-montaro.

En la regionoj, kie nun estas montoj kaj rokoj, troviĝis iam abundaj grenkampoj, arbaroj kaj herbejoj. Tie, ĉe la limo de la pola lando loĝis pola riĉulo, kiu nomiĝis Morski (Marulo). Lia translima najbaro estis juna kaj bela princo hungara. Tiu ĉi enamiĝis en la ĉarme bela filino de Morski kaj deziris edziĝi kun ŝi. La patro tamen ĵuris, ke li donos ŝin nur al samnaciano kaj ne al homo de alia gento.

La maljuna Morski estis militisto kaj devis subite iri kun sia reĝo en malproksiman regionon por militadi. Antaŭe li ankoraŭ sendis sian filinon en monaĥinejon, por ke ŝi tie restu ĝis lia reveno, minacante, ke li ŝin malbenos, se ŝi edziniĝus kun la Hungaro.

Sed Morski tre longe forestis. La juna knabino treege ĉenuis kaj dumtempe ankaŭ la juna kaj bela princo penis kun ŝi flirtadi. Li sendadis al ŝi belajn koralojn, rubandojn kaj aliajn trezorojn. Krom tio li sendigis al ŝi maljunajn aŭguristinojn, kiuj al ŝi antaŭdiris, ke ŝi fariĝos tre riĉa sinjorino kaj posedos arĝentajn palacojn kun oraj ĉambroj. Sorĉita per la maljunaj aŭguristinoj, la sopiranta knabino promesis forkuri el la monaĥinejo.

Iun vesperon antaŭ la muroj de la monaĥinejo aperis la juna princo vestita kiel monaĥo, krucosignante sin kaj laŭte petante almozon. Nenion suspektante la monaĥinoj enlasis lin. Dume la sorĉistinoj ne vidataj disĵetis ĉie sorĉan herbajon, kiu la monaĥinojn kaj la gardantajn hundojn endormigis. La princo kun la knabino povis nun facile forkuri. Veninte en sian regionon la princo tuj konstruigis por sia bela edzino ĉarman koralan palacon, brilantan de oro kaj de aliaj karaj ornamaĵoj. Nun la princino estis feliĉa, ĉirkaŭita de tiom da lukso, riĉeco kaj beleco...

Dum longaj jaroj ili tiel kune feliĉe vivadis kaj havis sep infanojn. La maljuna Morski ne revenis... La homoj rakontis, ke la Tataroj mortigis lin en batalo. Sciiginte tion, la filino sin vestis en funebran vestaĵon, prenis la reston de la patra posedaĵo kaj... jam sekrete mokis pri la patra malbeno.

Kaj jen iun tagon subite revenis la maljuna Morski en sian hejmon kaj demandis en la monaĥinejo pri sia filino. Oni montris al li la de malproksime brilantan koralan palacon. Intertempe ankaŭ la princino eksciis pri la subita reveno de la patro kaj iris riĉe vestita renkonte por saluti lin. Sed li krucosignis sin, surteren kraĉis kaj tiel forte piedfrapis, ke la tuta koralala palaco disfalis en polvon. Tiam li ekkriis: „Dio, donu ke Via edzo kaj lia tuta posedaĵo iĝu ŝtono“. Kaj kiam la princino alkondukis siajn infanojn kaj plorante genufleksis antaŭ la kolereganta patro, pardonpetante lin, li ankoraŭ pli multe ekscitita ekkriis: „Disfluu en Viaj larmoj kaj Viaj malbenitaj infanoj droniĝu en ili, ĉar nek Vi estas mia filino nek la infanoj miaj nepoj.

Kaj ĉio plenumiĝis laŭ la patra malbeno. Kampoj, arboj, palaco, brutaro kaj ĉio alia tute ŝtoniĝis. La princo vestita kiel monaĥo volis forkuri, sed dumvoje li ŝanĝiĝis en rokon, kiu ankoraŭ hodiaŭ

nomiĝas Mnich (Monaĥo). La princino ploradis, alvokis sorĉistinojn, sed ankaŭ tiuj nenion povis fari kontraŭ la patra malbeno. Ĉiu el ili nur ŝtelprenis po unu de la infanoj kaj forkuris. Sed ĉie elsub la tero ekkreskis tiom da ŝtonoj, ke la sorĉistinoj mortlacigitaj pereis dumvoje. Nur la infanoj restis kaj plorante laŭte vokis la patrinon, kiu ploregante alkuris... Kaj ŝi ploris, ploradis ĝis fine el la larmoj fariĝis laĝetoj, sep profundaj laĝetoj... kaj en ĉiu laĝeto kuŝis unu infano. Unu el la infanoj falis de alta roko en tiun lagon, kiu pro la familia nomo de la infano Morski (Marulo) ĝis hodiaŭ estas nomata „Morskie Oko” (Mara Okulo). Kiam nenio plu estis en la ĉirkaŭaĵo krom la laĝetoj kaj la dezertaj rokoj, la princino elplorinte siajn okulojn, ne plu povis plori kaj disfluis en unu lago kaj, ĉar ŝi estis nigre vestita, la tuta akvo nigriĝis. Tiun koloron ĝi konservis ĝis hodiaŭ kaj pro tio estas nomata „Czarny Staw” (Nigra Lago).

La homoj ankoraŭ nun rakontas, ke tie oni ofte aŭdas ploradon kaj veplendojn, ĉar la animo de la princino ĝemas petante helpon. Sed kiu aŭdinte kompatas ŝin kaj penas helpi al ŝi, tiu estas superŝutata per la neĝo dense falanta de la rokoj.

Kompilita laŭ pola originalo de **Fr. A. Prengel, Bydgoszcz.**

PRI LA ĈE-METODO.

Dum la lastaj du jaroj en Esp-istaj rondoj estiĝis diskuto pri tio, ĉu la instrumetodo aplikata de s-ro Andreo Ĉe estas nova metodo aŭ ne. Por klarigi la problemon ni demandis eminentan kompetentulon: s-ron **A. Rienks, regnan ĉefinspektoron de la Nederlanda publika instruado**, kiu en Hago kiel faka observanto partoprenis unu tutan kurson de s-ro A. Ĉ. S-ro ĉefinspektoro Rienks en sia ĉi-suba artikolo esprimas sian juĝon.

Hago, 25 Aprilo 1931.

INT. ĈE-INSTITUTO DE ESP.

a) REKTAJ INSTRUMETODOJ.

Antaŭ 30 jaroj diversaj lingvo-instrumetodoj kreiĝis kiel reakcio kontraŭ la metodo de ekzercaĵoj kaj vortlernado kaj oni nomis ilin „rektaj metodoj”.

Kelkaj komencis traduki la frazimpresojn de objektoj kaj iliaj ecoj montrante objektojn aŭ bildojn, grupigitajn laŭ la ĉirkaŭaĵo de la lernanto: lernejo, ĉambro, kuirejo, strato k. t. p. Tiuj metodoj nomiĝis rektaj, ĉar la gepatra lingvo ne estis intence kaj aŭdeble uzata. Oni ĉefe uzis substantivojn kaj la apartenantajn adjektivojn.

Nur poste venis la agoj, tamen ne laŭ propraj agoj de la infanoj. Tiel formiĝis rakontoj, projektataj en diversaj tempoj. Samtempe kun la agoj, kiuj esprimis la rilatojn inter la objektoj. Ĉi tie oni tamen forlasis la rektan vojon kaj la helpo de la gepatra lingvo estis necesa.

Aliaj rektaj metodoj prenis kiel bazon agojn de la instruisto kaj lernantoj; sen helpo de la gepatra lingvo oni tuj tradukis en la fremdan lingvon.

Kio en la unua metodo venis poste kaj do fakte ne laŭ la rekta vojo, tio nun tuj okazis. Ĉar ankaŭ laŭ ĉi tiu metodo aperis la objek-

toj en reciproka rilato, la efiko estis pli granda, ankaŭ pro la pli granda vigleco dum la leciono, sed nur tiam, kiam la instruisto posedis la necesajn kvalitojn. Tiu metodo postulis pli grandan kapablecon kaj pedagogian talenton de la instruisto.

b) LA ĈE-METODO.

La Ĉe-metodo por la instruado de Esperanto eliras de tute alia principo kaj estas tute alimaniere konstruita.

La lernantoj, ŝajne sen helpo de la instruisto tuj nomas objektojn, kvalitojn, rilatojn kaj agojn, formante frazojn sen ia uzo de la gepatra lingvo. Objektoj, bildoj kaj aliaj ĉiuspecaj helpiloj estas multe uzataj.

Tamen la sinsekvo de la materialo kaj ĝiaj instruiloj ne estas difinita de la objektoj kaj agoj grupigitaj laŭ loko kaj tempo, sed de la malfacilaĵoj, kiujn prezentas la lernota lingvo. Tiu sinsekvo estas tiel pripensita, la konstruo tiel logika, ke ĉiu parto donas eblecon al la lernanto mem formi la regulon sen ia penso pri gramatiko.

Tio rezultas el la fakto, ke la regulo formiĝas el praktikaj ekzemploj kaj tuj estas aplikata en la praktiko. Kun granda vigleco la regulo estas trovata kaj praktikata en rekta kaj neinteca kunlaboro kun la instruisto. Abundo da facilaj aplikoj memorigas la vortojn kaj frazojn, kvazaŭ senpene. La vigla pritrakto devigas la lernanton al propra laboro.

Nur la eksterordinare granda pedagogia talento de s-ro Andreo Ĉe kaj lia kvazaŭ intuitiva kompreno, kiuj tamen estas la rezulto de profunda pripensado kaj multaj eksperimentoj, povis produkti ĉi tiun metodon, kiu metas ĉiun parton sur ĝian lokon en la konstruaĵo. Kaj ĉar tiu konstruaĵo estas simpla, la Ĉe-metodo donas la eblecon kompreni kaj uzi rekte, intuitive kaj fruktoplene la lingvon Esperanto.

La metodo ne estas karakterizata ĉu de frazimpresoj, ĉu de agoj, sed de ambaŭ en reciproka rilato; ĝi iras super la materialon kaj laborigas la spiriton, kiu faras la konkludojn kaj denove aplikas ilin kaj gvidas al ordigita uzo de la nove lernita lingvo. Ĝi do entenas ambaŭ nomitajn specojn de rektaj metodoj kaj krom tio la spiritan elementon.

Pro tio **la Ĉe-metodo havas pedagogie kaj praktike plej altan efikon, ankaŭ morale.** La granda morala valoro estas, ke ĝi kondukas la lernanton al plena evoluo de propraj fortoj. **A. Rienks.**

ĈU ESPERANTO ESTAS FACILA LINGVO ?

Tiu, kiu uzas Esperanton preskaŭ ĉiutage, kiu post diligentaj kaj seriozaj studoj venis al konkludo, ke lia flua parolado ne estas plu arte konstruita tradukado de nacilingva penso, sed jam simpla, ekzakta esprimo de ideo ekspensita, — nur tiu povas kun pura konscienco diri pri si, ke li posedas la lingvon. Tiam la titola demando estas facile respondebla jese.

Kaj efektive, ne ekzistas fremda lingvo, kies ellernada tempo estus komparebla al tiu de Esperanto.

La logikeco en la konstruo, la minimumoj de esceptoj kaj idiotismoj, la simpligo de la gramatiko ĝis neimageblaj limoj, la neerarigo de la ortografio, — jen estas la kaŭzoj, pro kiuj lernado de tiu lingvo fariĝas ĝuo spirita.

Estas do nekompreneble, kial malgraŭ tiu proverba facileco bonaj espe-

rantistoj, en senco de lingvosciantoj, estas malofte troveblaj kaj malaperas en maro de „balbutantoj“.

En ĉiuj naciaj lingvoj oni atentegas kun pietismo la lingvan purecon. Akademioj, diversaj komisionoj, societoj kaj precipe publicistoj gardestaras kaj kreas ian estimpostulantan agordon ĉirkaŭ sia idiomo. En pola lingvo konata estas proverbo: „Eraro en la lingvo estas kvazaŭ graso makulo sur la blanka robo de via patrino“. La „fuŝistoj“ estas tiel priridataj (kaj rido estas la plej terura kaj efika armilo), ke malofte iu ajn kaptos la kuraĝon por publika elpaŝo.

Tiom multe oni eble ne rajtas ankoraŭ postuli de personoj, parolantaj tamen fremdan lingvon. Sed karakterize estas, ke en nenia lingvo oni tiel libere faras erarojn, kiel ĝuste en tiu plej facila. Entute sen la plej malgranda konscienciproĉo!

Nia kara esperanto-popolo bedaŭrinde ŝajnas forgesi pri tiu-ĉi minimuma estimopravo, kiun ĝi ŝuldas al sia lingvo. Kiamaniere vi ĝin propagandas aŭ eĉ instruas, se vi ĝin mem nesufiĉe posedas? Vi deziras, ke aliaj ĝin agnosku, kaj vi mem ŝajnas malserioze ĝin trakti. Ofte niaj kongresoj ne plenumas pro via sian propagandan taskon. Ĉu vi pensas, ke via balbutado ne okulfrapas, pli ĝuste, ne orelfrapas la publikon? Sed vi ankoraŭ malpli bone scipovas fari. Vi preferas ŝpari al vi la malfacilecon paroli fremdlingve, kunvenas kun viaj samlingvanoj kaj parolas kompreneble nacilingve. Sed jam vera malfeliĉo estas, se vi fuŝas en esperantaj internaciaj kunvenoj ian fremdan lingvon nacian! Diris al mi prave en Budapeŝto konata germana samideano, ke ia jugoslava kongresano, alparolinte lin germane, duoble lin ofendis: — kiel germanon, kies lingvon oni kripligis, kaj kiel esperantiston, kies ilon oni en tia necesa okazo ekignoris. Jen estas la plej granda maljustaĵo, farita de vi kont-aŭ via ideo!

Ankoraŭ freŝaj estas en nia memoro la eĥoj de la Oksforda Kongreso. Iu londona ĵurnalisto, kompreneble kontraŭulo de nia afero, kritikis esperantan kongreson, kie li plej parte aŭdis la anglan lingvon. Ni devas konfesi, ke tiu-ĉi kongreso havis escepte proporcie grandegan plimulton de angleparolantoj. Sed infine ĉiu kongresano devas ja konscii sian devon rilate la propagandan flankon de internacia esperantista kunveno. La voĉo de la londona ĵurnalisto estu avertito por la kongresanoj. Oni vin tie rigardas kaj aŭskultas. Evitu do la uzadon de naciaj lingvoj.

Malbone estas, ke la ekzemplo ofte ankaŭ venas de „supro“. Tro ofte ni povas aŭdi paroladojn de famuloj, kiuj ofendas la fundamentajn principojn de nia lingvo. Tio ja povas pruvi, ke Esperanto estas malfacila lingvo, se eĉ universitataj profesoroj ne povis ĝin tiel ekposedi, por povi en ĝi libere prelegi.

La partoprenintoj de la Danziga Kongreso eble memoras la akran diskuton inter d-ro Privat kaj adv. Litauer. Tiu lasta riproĉis, ke oni permesas prelegi en la Somera Universitato al personoj, kiuj ne sufiĉe posedas Esperanton, tiamaniere donante malbonan ekzemplon al aliaj (aplaŭdo). La respondo estis tre trafa: „Estas por ni honoro, se universitataj famuloj konsentas prelegi en Esperanto. En tiaj okazoj oni devas malatenti la lingvan neperfektecon“ (la samaj aplaŭdantoj plus kelkaj novaj!). Malgraŭ tiu-ĉi prava klarigo, ĉe multaj restis la malagrabla sento, ke oni vestis interesan temon en lingvaj ĉifonoj.

Ĉu vi ne samopinias, sinjoro d-ro Privat, ke estus jam tempo por ambaŭflanka honoro?

. . .

Ne maloftaj estas ankaŭ literaturistoj, kiuj kunagas kun la supre nomitaj lingvofuŝantoj. Kaj ĉar iliaj povoj estas pli grandaj, la malutilaj sekvoj estas multe pli senteblaj. Ĉu ne okazis al vi, ke kun malŝato aŭ eĉ naŭzo vi legis ian libron, aŭ ĝin entute interrompis pro la malpeza „malesperanta“ (en ambaŭ sencoj) lingvo. Mi ne volus ĉi-tie tuŝi la enhavon mem de la ĝis nun tradukitaj literaturajoj. Tiu temo postulas apartan vastan preparolon. Ĉiokaze indas ĉi-tie substreki, ke nia tiomfoje kun fiero „disportita“ literatura nombro staras en nenia proporcio kun la literatura kvalito. Ĉu povas esti alie, se la tendenco de la tradukistoj estas alproprigi en nian literaturon verkojn, gravajn laŭ ekspozicia aŭ propra propaganda vidpunkto. Ni jam havas tro multe da klasikaj „monumentoj“, diversaj perloj kaj trezoroj. La originaloj jam delonge dormas en ĉimo kaj polvo kaj delonge iam ĝuas netuŝeblecon de sanktaĵoj. La esperantistaro ne konsistas ja plene el kleruloj kaj literaturaj bongustuloj! Donu al ni ion modernan, ion niatempan, el la ĉiutaga vivo „kun sango kaj ostoj“. Ligu nin kun la tutmonda pulsanta skribarto, direktu al ni la fluojn, kiuj kanelas la nuntempan li-

teraturan vivon. Prezentu la majstrojn, kiuj kuraĝe elskulptas la alvenantan esta-
don. Pli da aero en niajn ŝimantajn bibliotekojn! Vi asertas, ke ni estas vivanta
popolo kaj vi donas al ni mortintan nutraĵon.

Ekposedita de sento, feliĉigi la tuthomaron per nova ĝis nun neaperinta
„ĉefverko“, tia-ĉi inspirita de dia graco verkisto, plenumas sian mision, bedaŭ-
rinde tro ofte super siaj kapabloj.

Pardonu al mi, kara leganto, la devojiĝon, kaj nun ni revenu al la interesan-
ta min lingva flanko de tiu-ĉi problemo. Kiel gardi nin de diversaj ŝmirajoj, kiuj
minacas niajn librarojn. Vi diros, ke la vivo mem tiun demandon reguligas. Vi
estas prava, sed ne plene. Ekzemple, niaj gazetrecenzoj entute ne estas
orientigaj. Ĉiam afablaj, tre singardaj en kritikado, tro moderaj en riproĉado,
ofte skribataj kun intenco ne malutili materiale al libro, kiu jam estas eldonita.
Pro tro senkonsidera kritiko la aŭtoro povos ofendiĝi. Eble li ankaŭ estas long-
jara abonanto de la gazeto kaj oni eĉ devas kelkfoje presigi liajn stultajn ver-
sajetojn. Do la esperanta recenzado ne staras ankoraŭ sur la dezirinda nivelo.
Malpermesi al iu ajn skribi aŭ traduki en esperanto estas laŭ Buloŝja Deklaracio
neeble. Sed ni povus en tute simpla maniero defendi nin kontraŭ la fuŝantoj.
Mi proponas starigi **Kolekton Aprobitan de Lingva Komitato**. La laboron farus
du-tri spertaj esperantistoj, salajrataj de la eldonistoj pere de ĉiufojaj depagoj.
La Komisiono kontrolus la manuskriptojn laŭ la lingvo kaj farus en ĝi korektojn.
En certaj okazoj ĝi resendus la eldonotaĵojn kiel nepresindaj. La kolekto apro-
bita de Lingva Komitato, simile al tiu de d-ro Zamenhof, rapide akirus famon
tra Esperantujo, kaj neniu eldonisto kuraĝus ion presi sen tiu aprobo, minacate
de venda fiasko. La Kolekto fariĝus malvarma duŝo por tiuj „verkistoj“, kiujn la
ŝajna facileco de Esperanto forgesigis, ke por verki „eĉ“ en Esperanto, necesas
posedi sperton aŭ „almenaŭ“ talenton. Memkompreneble, nia „Kolekto“ povas
neniel esti ligita kun ia eldona firmo. Ni memoru pri la akraj disputoj pro la
Hachette'a monopolo!

Cu tiu-ĉi dume nur libere skizita propono estas pripensinda?

Eble ni ne tre bone faras, reklamante la facilecon de nia lingvo. Okazas
ofte, ke montrante al iu esperantan tekston, vi aŭdas: „Ĝi ja estas fable facil!
Sciante iom da latina, iom da franca“ ktp... Li forgesas, ke Esperanto estas ne
nur vort-aro facile komprenebla, simpla gramatiko kaj ortografio, sed genia
tutajo kun internacia spirito, kun reguloj, leĝoj, principoj kaj nun eĉ kun kuti-
moj. Ne sufiĉas do koni la apartajn simplajn partojn. Plej grave estas scii ilin
ligi. Kaj tio postulas laboradon kaj studadon. Kvazaŭ vi havus brikojn, cementon,
kalkon ktp., sed „nur“ mankus al vi la scio starigi muron. Estus malbone pri
Esperanto, se ĝi estus tiel facila, ke sen lernado, nur kun scio de
„iom da latino“ ĝi estus skirebla. Ni havus tiam malvivan senspiritan tro
logikan sistemon, ian pazigrafion, aŭ kodon, kaj ne lingvon, kapablan esprimi
ĉiujn nuancojn de la homa intelekto. Tion, kio formiĝadis en aliaj naturaj lingvoj
dum jarcentoj kaj jarmiloj, Esperanto ekposedis genie dum tiel mallonga tem-
po, nur dank' al ĝia unueca spirito, kiu ŝvebas el ĝiaj bonaj literaturaj verkoj
kaj per kiu saturitaj estas niaj internaciaj kunvenoj.

Cu ni ne malseriozigas Esperanton en la okuloj de l' vasta publiko, se ni
certigas, ke sufiĉas trimonata kurso por ĝin ellerni? Ni ja bone scias, ke nur unu-
opaj esceptuloj, inteligentaj kaj laboremaj, finas la kurson kun vere kontentigaj
scioj. La pli granda parto foriras kiel „balbutantoj“, kiuj preskaŭ neniam pro-
gresas ĝis grado de vera esperantisto.

Bedaŭrinde dum ni ankoraŭ vivas en la pronaganda periodo, ni ne po-
vas forlasi tiun iom blufan reklamon. En la enkonduka leciono mi kutimas aten-
tigi, ke Esperanto malgraŭ sia facileco postulas seriozan kaj diligentan lernadon.
Tiu, kiu venis lerni, intencante nenian laboron oferi, prefere jam foriru, ĝar li
„disreviĝos“ pri la facileco de Esperanto. La rezultoj de tiu averto ŝajnas al mi
kontentigaj.

Ni estimu nian lingvon, ni amu ĝin kaj studu. Ja meritas tion lingvo uni-
versala kaj ligitaj kun ĝi universalaj tuthomaraj ideoj.

M. Dembiński.

**JAŬDE, LA 16-AN DE JULIO, JE LA 17.35 HORO, ĈIUJ POLAJ RA-
DISTACIOJ DISAŬDIGOS PRELEGON DE PROF. BUJWID PRI LA KONGRE-
SO EN KRAKÓW.**

23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Kraków, 1—8 aŭgusto 1931.

OFICIALA BULTENO.

15 JULIO 1931.

Adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, Lubicz 34, Pollando.

Antaŭkongresa oficejo funkcias nune seninterrompe en la Industria Muzeo str. Smoleńsk 9, II. en ĉambro 129. Adreso por la poŝto restas la sama t. e. str. Lubicz 34.

Kotizo: Zł. 44.—, Helpkongresanoj kaj studanta junularo Zł. 22.—, infanoj ĝis 14 jaroj Zł. 11.—. Blinduloj ne pagas kotizon.

Pagmaniero: Per poŝtĉeko, poŝtmandato, bankĉeko, monbiletoj en registrita letero. — Plej malmultekosta pagmaniero estas pere de Pola Poŝtsparkaso al nia konto: 23. Universala Kongreso de Esperanto, Kraków Nro 410975. — Tia transpago estas ebla el: Aŭstrio, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Latvio, Nederlando, Svedujo, Svisujo. — Demandu pri tio en via poŝtoŝtanco.

Garantia kapitalo: Gärdmark, Göteborg zł. 12, N. N. Gravenhage zł. 10. Sumo zł. 82.

Donacoj: Adamek Neu-Oderberg zł. 4, Friedman, Dresden zł. 2, F. Benisch, C. Tešin zł. 2, Höfer, Chemnitz zł. 4, Štamers, Liepaja zł. 0.50, Sjöholm, Lidköping zł. 3.60, M. Almquist, Oslo zł. 6. Sumo 206.91 zł.

